



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

P. BABIN

Le Haut des Bourrellières

17, rue Romain-Rolland

85100 Le Château-d'Olonne

P.C.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

Jarabono : 70 fkoj

1992 — 3

(JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Skribistoj en Antikva Egiptujo...



... kaj la mistera Kristoforo Kolombo

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

paĝo

El Gresillon	1
Esperanto tra la mondo	2
Skribistoj en antikva	
Egiptio (S.Böniol)	3-4
Vojaĝemaj Esperantistoj	5
Mistera K. Kolombo (F.Boyot)	6-8
Stranga Procesio (F.Mistral)	9-10
Monte Kristo (A. Dumas)	11-13
Por via Distro (J.Turbillon)	14
Kelkajn minutojn kun J.L.Mahé	15-16

El Gresillon

Antaŭ 40 jaroj! Jes, antaŭ 40 jaroj, la unuan fojon, la Esperanto-Domo Gresillon malfermis siajn pordojn. Diskrete, en julio, la ĉeestantoj kaj kelkaj lokaj geamikoj festis tiun eventon. Dum la honor-vino la prezidanto parolis pri la Esperanto-Domo kaj, posttagmeze estis prezentata prelego pri Gresillon antaŭ la alveno de la esperantistoj kaj post tiu alveno dum la 40 sekvaj jaroj. Longa, riĉa historio.

Sed ĉi jare Gresillon ne akceptis tiom da staĝanoj, kiom la antaŭajn jarojn. Kial? Okaze de la venonta kunveno de la konsilantaro, la 25-an de oktobro, espereble estos trovitaj respondoj. Se la kialo estas la konkurenco kun pli kaj pli granda nombro da Esp. renkontoj, staĝoj, aranĝoj diversaj en la

tuta mondo kaj ĉefe en Eŭropo, ni ĝoju. Verŝajne estas ankaŭ aliaj kialoj. Serioza pripensado necesas.

Tri semajnojn post la festado de la 40-a datreveno atingis nin la informo, ke mortis Jacques-Louis Mahé, tre konata verkisto, kies plum-nomo estis Lorjak, kaj aŭtoro de la unuaj filmoj en esperanto. Por ni ankaŭ malaperis amiko de la unuaj jaroj de la Esperanto-Domo. En tiu numero de la revuo vi trovos republikigon de intervjuo kun J.L. Mahé aperinta en septembro 1963, pri la filmo "Angoroj". (Video kasedo de tiu filmo estas havebla en nia Libro-Servo.)

Pierre-Alexis, kiu naskiĝis en Meksiko la 14-an de julio 1990, trovis feliĉon en la brakoj de Pascale Babin. La tuta familio ĝojegas,

Esperanto tra la Mondo



U.K. EN VIENO- Pli ol 3 000 partoprenantoj ĉeestis la 77-an universalan kongreson de esperanto en la Aŭstria-centro de la Unuiĝintaj Nacioj en Vieno, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. Malgraŭ la monaj malhelpaĵoj venis centoj da esperantistoj el orienta Eŭropo. 172 kunvenoj estis programitaj kun riĉa kultura programo. La hispana ambasadoro venis por inviti la kongresanojn al la kongreso en 1993.

ESTONTAJ UNIVERSALAJ KONGRESOJ-

Ili okazos: en 1993 en Valencio (Hispanio) de la 24-a ĝis la 31-a de julio; en 1994: Seulo (Koreio); 1995: Tampere (Finnlando). Junularaj kongresoj: 1993: Vraca (Bulgario); 1994: en Koreio. Fervojista kongreso: 1993: en Cervia (Italio) 6-12a de junio.

POR LA JARFINO- 36-a Internacia Seminario de Germana Esperanta Junularo en Borgwedel, de la 27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro. Temo: "Lernado kaj Edukado por la 90-aj jaroj". Informas: GEJ, IS-administrado, Unter den Linden 36-38, D-0-A-086 Berlino.

Internacia esperantista renkonto Eŭropo-Azio 92 "La rusa vintro", de la 29-a de decembro ĝis la 5-a de januaro, en Jekaterinburg, Moskvo. Ekskurso al la siberia urbo Toboljsk, la rusa novjaro. Informas: "Eŭropo-Azio 92", pk 67, 620077 Jekaterinburg 77, Rusio.

EL SLOVENIO- En Maribor, fondiĝis kulturcentro Interkulturo, Kočevarjeva 12, Maribor, Slovenio), kiu jam organizis la unuan internacian renkontiĝon de posedantoj de manuskriptoj en esperanto. La sekva borso okazos en Maribor la 12-13an de decembro 1992. Interkulturo agados simile al Internacia Kultura Servo en Zagreb (Kroatio).

EL BJELORUSIO- La bjelorusaj esperantistoj, kiuj organizas nacian esperanto-asociacion, havas imponan laborplanon: kolekti monon por aĉeti la domon,

kie loĝis momente Zamenhof kaj rekonstrui ĝin, kiel bazon por plua agado, kun biblioteko kaj muzeo; eldoni vortarojn; fondi turisman sektion kaj agi sur la komerca tereno.

EL PRAGO- Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino, kiu uzas esperanton, havis studsesion en Ĉeĥoslovakio. La reprezentantoj de Karla Universitato de Prago promesis malfermi registron de AIS-gradoj aprobitaj kaj uzeblaj en Ĉeĥoslovakio kaj jam disponigis al AIS oficejon en Prago.

SCIENCISTOJ, TEKNIKISTOJ- Tute reorganizita, Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) invitas ĉiujn sciencistojn, teknikistojn, koncernatajn edukistojn esperantistajn membrigi en la asocio. Informas: Rudi Hauger, Ringstrasse 13, CH-8172 Niederglatt, Svisio, kiu eventuale indikos al vi la adreson de via nacia delegito. Kotizo: 25 svisaj frankoj, kiu inkluzivas la abonon al "Scienca Revuo".

JURNALISTOJ- Sub la gvido de prezidanto Stefan Maul, Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA) denove bone funkcias kaj reaperis la organo "Internacia Ĵurnalistoj". La koncernatoj povas rilati kun Stefan Maul, Pferseer strasse 15, DW-8900 Augsburg.

KOMERCISTOJ- Pere de la bultenoj "La Merkato" kaj "Monda Merkato", Internacia Komerca kaj Ekonomika Fakgrupo kunligas la komercajn esperantistojn (ĉiujmonate ankaŭ aperas aparte "Ekonomia Bulteno pri Usono"). Informas: S-ro Franz Jozef Braun, Homisgrindstr. 8, DW-7580 Bülh 16, Germanio.

PROPONO DE HEROLDO- Vi povas ricevi senpage la duoblan septembran numeron de "Heroldo de Esperanto" kun ilustrita raporto pri la Universala Kongreso de esperanto en Vieno. Sendu mendon al: Heroldo de Esperanto, Via Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (Torino).

SKRIBISTOJ EN ANTIKA EGIPTIO

Skrībistoj estas nedisigeblaj de la historio de Egiptujo ekde la malnova imperio (-3000 a.K.). En tiu lando notindas tri kune disvolviĝintaj realaĵoj: centralizita administracio (kies kerna elemento estis la skribistoj), strebado al majstreco pri la nila plialtiĝo, potenco kaj dia karaktero de Faraono.

La skribmaterialo de skribisto konsistis el: paletro deŝultre pendanta kun du ujoj por la inkoj nigra kaj ruĝa (nigra por la tekstoj, ruĝa por la titoloj kaj rubrikoj); pintigitaj kalamoj kaj granda ujo por ordigi la kroman materialon; rulaĵoj kunligitaj kaj kuŝantaj en grandaj kofroj (ovalformaj estis la dumvojaĝe porteblaj kofroj); papirusoj, sur kiuj kuŝis la oficialaj tekstoj, ĉefe la entemple arĥivendaj religiaj dokumentoj; kalkopecoj kaj specoj de stukkovritaj lignotabuloj (ambaŭ forviŝeblaj) por malneto aŭ ĉiutagaj skribaĵoj.

Duspecaj estis la hieroglifaj ideogramoj: bildvortoj (ekzemple por la vorto "buŝo" oni desegnis buŝon); bildsonoj, pli precizaj: konvenciaj signoj por prezenti la esprimotajn vortojn. Sed plejofte la skribisto uzis kursivon.

En ikonografio aperis la skribisto ne nur kun sia materialo, sed ankaŭ kun scepro (emblemo de potenco) kaj bastono (por pumbati la nehonestaĵn vilaĝestrojn, kiuj ŝtelis pri la devigaĵ kvantoj da greno, biero aŭ brutoj). La sida (kaŭra) pozicio signis dignon. La zontuko rolis, kiel surgenua tablo, sur kiu la maldekstra mano malvolvis la rulaĵon. En la malnova arto, la skribisto aperis sub vivoplenaj trajtoj (la statuo devis ebligi, ke la animo identigu sian posedinton). Foje sida paviano pompis surkape (aŭ surperuke), kiel emblemo de la protektanta diaĵo Thot.

La estontaj skribistoj estis instruataj ne nur en la reĝa palaco aŭ ĉefaj temploj, sed tra la tuta lando, inkluzive de vilaĝoj, kie la administra respondeculo transdonis siajn sciojn al la infanoj. Precipe al la knaboj (la tiel-nomataj "skribistinoj" respondis al niaj ŝminkistinoj aŭ beligistinoj). Tamen multaj virinoj scipovis legi kaj skribi. La knaboj lernadis de la aĝo 6/8 jarojn ĝis la aĝo 13/15. Du principoj regis: senlace ripetadi vortojn, frazojn, tekstojn kaj parkere ilin scipovi; uzi entutigan metodon tre similan al tiu freŝdate uzata ĉe ni por majstri la 700 hieroglifojn kaj ties kombinaĵojn. La knaboj "aŭskultis kaj lernis per la dorso", kio signifas, ke la instruisto estis lerta pri skurgouzo.

Kiuj estis la studobjektoj? Instruado civitana, morala, eĉ ideologia sur la tekstoj baziĝantaj; gramatiko, kalkulado (la Egiptoj majstris la unuajn du operaciojn, la aliajn ili solvis pere de simplaj frakcioj). La ĝenerala kulturo konsistis el parkerigo de longaj listoj da vortoj kaj ties senlaca kopiado. Tiuj listoj koncernis astronomion, geografion, natursciencon, homanatomion. Ankaŭ literaturon la studentoj pristudis, ĉar ekfloris fabeloj, eĉ romanoj en la tempo de la Ramses-dinastio (la tiama lingvo povus esti komparata kun la nia dum la XVII-a jarcento). Ankaŭ praktikan instruadon la juna skribisto ricevis: li akompanis la instruiston sur la laborlokon kaj partoprenis en kopiado de dokumentoj aŭ kalkul-kontrolado. La lernantojn taksatajn taŭgaj oni sendis al iu templo (ĉiam samtempe administra kaj religia centro), kie ili plilarĝigis kaj perfektigis siajn konojn, inkluzive de la redaktado de administraj dokumentoj, ĉar la egipta administracio baziĝis sur konstanta irmovo supre malsupren kaj inverse. Lerta skribisto kapablis vortigi same bone ordonon al subulo, kiel peton al superulo.

La skribistajn lernejojn oni nomis "domoj de vivo". Ĉar fakte ne nur lernejoj estis tiuj kultur-

centroj, sed arĥivejoj kaj medicinaj studlokoj (aparte famiĝis Saĥs, en la delto dum la unua jarmilo). Eĉ pli: estis tie instruata magio, la plej alta scienco rilatiganta la homon kun la universo kaj diaĵoj.

La centra administracio jene dividiĝis: "justico" regata de veziro (la plej altranga funkciulo, kvazaŭ ĉefministro); "trezoro kaj grenejoj" (la internacia negoco estis reĝa monopolo); "reĝa bienaro" (oni distingu tri tipojn de grundoj: la marĉajn, la grenodonajn, kiujn la plialtigo de Nilo superakvigis, la plej altajn, kultivatajn, kiel ĝardenojn); "la palacoprizorgado", kvankam aparta sektoro, konsistigis enviindajn laborpostenojn, ĉar la proksimeco al la reĝo povis esti okazo por suprenleviĝo; "Komisioj eksterlanden" (ĉu sciencaj, ĉu komercaj) kaj diplomataj rilatoj. Tiu fako ampleksiĝis laŭmezure, kiel Egiptujo mem vastiĝis (konkerado de la teritorioj ĝis la tria Nil-katarakto; sub la XVIII-a dinastio la egipta potenco etendiĝis tra Sirio kaj Palestino ĝis Eŭrato).

La samaj administraj strukturoj troveblis en la provincoj (nomarkioj). Altrangaj gravuloj estis la nomarkoj, kiuj agnoskis la aŭtoritaton de la reĝo kaj informis lin pri sia agado, sed ĝuis sufiĉe grandan kubut-liberecon pri la surlokaj decidoj.

Kutime la skribistoj eniris difinitan formalaĵ-ĉenon kaj travivis la tutan karieron en ĝi. Iliajn ŝatatajn servojn la reĝo rekompencis per donacoj plejofte rilatigantaj al la tomb-aranĝo. Dum longa tempo la skribistoj estis devigataj de tempo al tempo deĵori en temploj por plenumi taskojn, ĉu administrajn, ĉu kultajn, sed poste ili specialiĝis.

Principe la nura pastro estis Faraono: pro lia dia naturo nur li kapablis senpere kontakti la diaĵojn kaj interŝanĝi kun ili. Ĉiuj ceteraj pastroj estis liaj anstataŭantoj. Por kompreni la evoluadon de la pastreco kaj pastraro, oni distingu du periodojn: la

malnovan kaj mezan imperiojn unuflanke, la novan (depost -1560 proksimume) aliflanke. Dum la malnova kaj meza -kiel jam dirite- skribistoj, do administraj funkciuloj, deĵoris en temploj dum difinitaj periodoj (du monatojn) en du skipoj po dek servantoj; poste ili revenis al siaj kutimaj taskoj. Dum ili deĵoris en temploj ili estis titolataj "servistoj de la diaĵo". Nur ritara fakulo (la "pastro legisto" laŭnome) estis iaspeca profesia pastro. Sed ne ĉiuj pastroj estis devige skribistoj: kelkaj tre malaltrangaj (la "puruloj") plenumis humilajn taskojn; aliflanke kaj inverse, altranguloj ĉe faraona kortego ne spitis tiajn humilajn farenaĵojn (ekzemple: altestimata perukisto zorgis pri fermado kaj malfermado de templaj pordoj).

Dum la nova imperio pli kaj pli gravis la templa potenco kaj riĉeco laŭmezure, kiel la lando mem plivastiĝis kaj pliriĉiĝis. Multobliĝis deĵorantaro (ekzemple: 5 000 personoj en Memphis, 10 000 en Heliopolis ĝis 86 000 en la templo de Amon en Karnak). Ĉar ne nur kultaj taskoj estis plenumendaj sed ankaŭ administraj pro tio, ke templo konsistigis tre vastan bienon.

Jen la diversaj ŝtupoj de la pastraro: la puruloj, la servistoj de la diaĵo (kaj ritarfakulo), kvara, tria, dua kaj unua profeto, - ĉi lasta vera pastrara ĉefo ĝuste sub Faraono.

Duspeca estis la kulto: ĉu tomba, ĉu diaĵa. Sed ambaŭokaze ĝi ebligis, ĉu la vivdaŭrigon de la estinta reĝo en la transa mondo, ĉu la manifestigon en nia mondo de la diaĵo, al kiu estis omagite. Tia estis la celo de la ceremonioj ĉiutagaj kaj okazaj. En la jam preparolitaj "domoj de vivo" pli kaj pli klera pastraro amasiĝis rulaĵojn pri filozofio, mitoj, teologio, dank'al kiuj ni tiom multe scias pri antikva Egiptujo.

S. Boniol

(laŭ prelegoj en Sorbono)

VOJAĜEMAJ ESPERANTISTOJ

Esperantistoj estas fervoraj vojaĝemuloj, ne nur kiel partoprenantoj en kongresoj kaj aliaj internaciaj esperanto-aranĝaĵoj, sed ankaŭ kiel turistoj, vagemuloj kaj el-kaj-en-migrantoj. La sekvaj alineoj priskribas la vojaĝplanojn for de la hejmlando de kvin famaj esperantistoj. Ĉu vi povas identigi ilin?

1- Irlanddevena angla filologo, kiu studis la ĉinan lingvon ĉe la universitato de Oksfordo, esperantiĝis en 1887 kaj tiel verŝajne estis la unua angleparolanta esperantisto. En 1891 li elmigris al la ŝtato Uaŝingtono en la nordokcidenta parto de Usono. De tie li iris al Alasko en 1903, kie li dediĉis sin al studo de la indiĝenaj lingvoj kaj verkis vortaron kaj gramatikon de la aleuta lingvo. Lia plej grava verko pri Esperanto estas la dua traduko en la anglan lingvon de la "Unua Libro", kiun li faris en 1889, avertinte d-ron Zamenhof, ke la unua angla traduko estas tre malbona. En 1905 li estis elektita ano de la Lingva Akademio.

2- Ĉefa poligloto lernis Esperanton en 1887 kaj, en 1890, eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj. Pro politikaj kialoj li devis elmigri, do li vojaĝis al Sudameriko en 1893 kaj ekloĝis en Brazilo. Fariĝinte brazila civitano li oficis kiel tradukisto, ŝtata funkciulo kaj lernejestro. Li estis la unua esperantisto en Brazilo, kiu aktive uzis Esperanton, precipe por tradukado de beletraĵoj. Lia plej grava verko estas la traduko el la sanskrita lingvo de la hinda klasikaĵo "Bhagavad-Gitâ", eldonita en 1942. Li estis adepto ankaŭ de spiritismo kaj lia verko "Voĉoj de poetoj el la spirita mondo" (1947) enhavas poemojn de pluraj poetoj, mediume diktitajn.

3- Franca lignaĵisto lernis Esperanton dum la milito de 1914-1918 kaj

ekvojaĝis en 1936 por iri ĉirkaŭ la mondo vizitante Japanion, Aŭstralion, Nov-Zelandon, Argentinon, Ĉilion kaj Meksikon. Li estis la fondinto en 1921 de Sennacieca Asocio Tutmonda, internacia laborista Esperanto-organizaĵo. Li redaktis "Sennacieca revuo" kaj pritraktis sian propran liberecanan doktrinon, la sennaciismon, en la verkoj: "For la neŭtralismon!" (1922) kaj "Manifesto de la sennaciistoj" (1931). Lia ĉefa beletra verko estas la traduko de "Kandid" de Voltaire (1929).

4- Juna sviso, kiu lernis Esperanton en 1903 kiel gimnaziano, faris sian unuan vojaĝon al Anglio kaj Usono en 1907 por lerni la anglan lingvon kaj propagandi Esperanton. Poste li daŭrigis siajn studojn en Francio ĝis la eksplodo de la unua mondmilito. Dum la militjaroj li vojaĝis en orienta Eŭropo kiel ĵurnalisto kaj interesiĝis pri la problemoj de naciaj minoritatoj. En la 1920-aj jaroj li laboris en la Ligo de Nacioj, kaj rezulte de liaj klopodoj, la Ligo okupiĝis pri la rolo de Esperanto en la edukado kaj la telegrafio. Poste li iris al Italio kaj Hindio en 1931. Lia plej fama verko estas biografio de Zamenhof, publikigita la unuan fojon en 1920.

5- Blinda poeto vojaĝis el Ruslando al Japanio, kie li loĝis de 1914 ĝis 1921. Tie li verkis fabelojn en Esperanto kaj en la japana lingvo. Forpelita el Japanio pro politika agado, li iris al Ĉinio, kie en 1922/1923 li instruis Esperanton en la Universitato de Pekino kaj ankaŭ prelegis en Esperanto pri la rusa literaturo. Li estis premiita en la Nurenberga Universala Kongreso (1923) pro deklamo de sia poemo "Ciganino". En 1924 li reiris al Sovetio, vagadis al norda Siberio kaj Turkeŝtano, kaj fine revenis al sia hejmmregiono en Ukrainio. Du volumoj de liaj rakontoj aperis en 1923: "Turo por fali" kaj "Rakontoj de velkinta folio". Lia ĉefa poezia verko estas "Gemo de unu soleca animo" (1923).

B. GOLDEN

La respondoj estas sur paĝo 8.

LA MISTERA

KRISTOFORO

KOLOMBO

La infano en Ĝenovo - Oni scias, ke Kristoforo Kolombo maskiĝis en 1451, ĉar li deklaris sin 19-jara en 1470 okaze de ŝuldo, kaj ke la 25-an de aŭgusto 1479, en notaria akto, li sin diras 27-jara. La plej malnova dokumento, kie oni trovas la nomon "Kolombo" estas metilernada kontrakto, en 1429, kaj rilate al Domeniko Kolombo. En 1429, tiu Domeniko estas majstro pri teksado. Sed oni ankaŭ diras, ke tiu Domeniko edziĝis al Suzana Fontarosa, kiu estas laŭdire (sed sen pruvo) jud-devena. Domeniko kaj Suzana posedas gastejon, kie la ĝenovaj maristoj rakontas travivaĵojn pri siaj vojaĝoj.

La unua mistero kuŝas en la kontraŭdiroj: unua tezo: li estis infano de familio de teksistoj (juda aŭ ĵuskonvertita), kiu venis de Hispanio kaj ne parolis la italan lingvon; dua tezo: la infano vivis en gastejo, kie li aŭskultis anekdotojn de la italaj maristoj. Krom tio oni scias ke, en Ĝenovo, en 1458, oni multe parolis pri iu naviganto, kiu riĉiĝis per komerco por la Portugaloj. Kia modelo por la 7-jara infano. Oni scias, ke Kristoforo lernis la latinan lingvon, kaj, ke li legis la rakontojn de Marko Polo (en kiu lingvo?).

La profesia naviganto (1471-1476)

Kristoforo 20-jara dungiĝis en Ĝenova firmo, kiu serĉis "bonajn vendistojn, kiuj ne suferas pro la marmalsano". Tiel Kristoforo navigis por la komerca firmo. Poste la situacio estas ne tre klara. Oni supozas, ke Kolombo laboris por diversaj mastroj, kiuj lin elektis laŭ ĉiu misio. Tio klarigus lianiron: "Okazis, ke la reĝo Renato (la duko de Anĵuo) sendis min ĝis Tunizo por kapti Ferdinandan galeron" (temas pri Ferdinando de Aragono), kaj oni supozas, ke tio okazis en 1472.

Pri la transiro de Italio al Portugalio oni rakontis, ke Kolombo alboardis

Portugalion en 1476 post surmara batalo, kiam Kolombo preskaŭ mortis kaj naĝis al la plej proksima bordo. Sed ĉar tiu rakonto estis redaktita poste, oni povas supozi, ke ĝi estis aranĝita por plibravigi la naviganton. Laŭ alia tezo, Kolombo tute simple transiris de la Ĝenova firmo al filio de la sama firmo, kies sidejo estis en Lisbono. Pri tiu periodo, inter 1471 kaj 1476 estas nebulo, kien oni povas meti diversajn heroajn noblajn batalojn aŭ kontraŭe korsarajn rabadojn.

Kolombo en Portugalio (1476-1485)

Oni jam scias, ke Portugalio, en tiu 15-a jarcento, estis la lando de Henriko la Naviganto, kiu instigis al malproksimaj vojaĝoj. Kolombo, restis dum naŭ jaroj en Portugalio, sed navigis al diversaj lokoj, verŝajne ĝis Islando, eble Grenlando. En la sama urbo lia frato Bartolomeo vendas mapojn por maristoj kaj ankaŭ rakontojn pri vojaĝoj. Oni scias ke Kristoforo multe legis: "Historia rerum" de la papo Petro la dua, "Imago mundi" de la franco Pierre d'Ailly, "La Libro de la Mirindaĵoj" de Johano de Mandeville. Sed krome, li legis ne nur la Biblion, sed ankaŭ verkojn de Seneko, Plinio kaj Aristotelo. Li scias, ke la tero estas globforma dank'al la ĵusa traduko de Ptolemeo kaj krome li legis leteron de iu astronomo Paolo Toskanelli pri insulo "Antilia" inter Eŭropo kaj Indioj. Mi citas tion en la mistera vivo de Kolombo, ĉar li mem ĉiam mutis pri tiu legado, por diri, ke Dio rekte instruis lin.

Kolombo edziĝis en Portugalio kun Felipa Moniz Perestrelo, kiu naskis la unuan filon nomata Diego, kiu naskiĝis en Madejro. Kristoforo ankaŭ vivis en Acoroj, kie li eksciis pri skulptitaj lignaĵoj, pri larĝvizaĝaj kadavroj alportitaj de okcidenta fare de la maro. Dank'al sia edzino, kies patro estis guberniestro de Madejro, Kolombo estas akceptita en kortego, kie li prezentas, en 1484, projekton de vojaĝo por iri al Indio laŭ okcidenta vojo. Mi jam diris, ke tiu projekto baziĝis sur eraraj kalkuloj, kaj tute prave, la tieaj sciencistoj proponis la

rifuzon de la projekto. Samtempe la religiuloj, kiuj opiniis, ke la okcidenta oceano estas rezervita al Diablo ankaŭ proponis la rifuzon, kaj Kolombo devis serĉi alian protektanton.

Kolombo en Hispanio (1485-1492)

Kiam li foriris de Portugalio, Kolombo restadis en la Franciskana monakejo de La Rabida, sudokcidente de Hispanio. Oni devas scii, ke tiam li estis vidvo. Li amikiĝas kun la estro de la monakejo Juan Perez, kiu tiam estas la konfesanto de la reĝino Izabela. Kolombo ŝanĝas sian nomon al Kolon kaj skribas sian personan nomon tiel: XpoFerens, kiu signifas Kristo-portanto. Li kompletigas sian kristanan religiemon per aliĝo al la tria ordeno de la Franciskanoj. Tre verŝajne li renkontis la "nekonatan mariston", kiu mortis inter liaj brakoj en tiu periodo. Sed laŭ la rakontoj, tio okazis en Porto Santo aŭ en Huelva aŭ eĉ en Madejro. Tiu epizodo restos tiel mistera, kiel la legado de la letero de la astronomo. Sed oni povas kredi pri tiu renkonto, kun maristo, kiu estus reveninta de la okcidenta (diabla) oceano, ĉar kiam Kolombo revenis de sia unua vojaĝo, li elektis vojon, laŭ la nordo, same kiel li estus sciinta pri la tieaj ventoj (kontraŭ-alizeoj). Sed en tiu periodo, Kolombo estas la portanto de Kristo, kiu scias nur pere de Dio kaj la religia influo ne estas neglektinda, kiam oni pledas antaŭ Izabela la katolikino, pere de Franciskano Juan Perez.

En 1486 Kristoforo renkontas la reĝinon en Kordobo, kaj sian estontan kunvivantinon, Beatrica (Beatriz Enriquez de Arana), kiu estos la patrino de la dua filo de Kristoforo nomata Ferdinando. Post tiu renkonto, oni nomas komision de ekspertoj. Izabela estas favana, sed la reĝo Ferdinando ne akceptas. Inter 1486 kaj 1492, Kristoforo denove renkontos la reĝon de Portugalio (kiam Diaz malkovris la orientan vojon) dum Bartolemeo, la frato, petos la helpon de la reĝoj de Anglio kaj Francio, sed vane. En 1490 la hispanaj ekspertoj taksas la projekton utopia kaj konkludas,

ke tia vojaĝo, se ĝi estus ebla daŭrus tri jarojn. En 1491 kaj 1492 Kolombo kvazaŭ sieĝas la reĝojn, kiel farus korigano; li estas samtempe servema kaj postulema, kaj li deziras esti Admiralo de la oceana maro, admiralo de Kastilio, vic-reĝo de la Indioj. Li uzas ĉiujn argumentojn, estas vera komercisto por vendi sian projekton. Ĉar kutime la franciskanoj ne estas tiel lertaj komercistoj, revenas la demando: kiu estas la religio de Kolombo?

Ĉu Kristoforo Kolombo estis judo?

Ni jam citis la du teoriojn pri la deveno de la familio de nia naviganto. Sed estas ankaŭ interese studi la "kulturon" de tiu homo. Oni devas scii, ke en tiu epoko, kiam la judoj estis pli malpli devigataj aŭ migri aŭ konvertiĝi al la kristana religio oni renkontis homojn kiuj estis: 1) jud-devenaj, sed denaske kristanoj; 2) judoj dumvive konvertitaj; 3) oficialaj kristanoj, kiuj sekrete estis judoj. La prizorgantino de la muzeo de Alkazar asertas: "En tiu epoko, iu malnova kristano ne plu parolis pri konkerado de Jerusalemo."

Juan Gil skribas pri tio: "Li estis judo, kiu ne konvertiĝis (hispane "marrano"). Sufiĉas legi lian verkon. Paroli pri la konstruo de la dua templo ne estis kristane. Meti samnivele la Apokalipson de Sankta Johano kaj la profetaĵojn de Jesaja, tio estis kunigi la finon de la Mondo kun la veno de Mesio. Kaj li parolas pri si same kiel Moseo aŭ Davido, li ne komparas sin al Johano la Baptisto".

Kiam li redaktas la "Libron de la profetaĵoj", en la komenco de la 16-a jarcento (li tiam perdis sian povon), li sin rekomendas de la Biblio de konvertita judo Nikolao de Lyre, kaj li nomas lin laŭ lia juda nomo: Rabi Samuel. En 1492 Talavera, la tiama konfesanto de la reĝino, skribas al Izabela, ke Kolombo estas el "duba" deveno, kaj tiu Talavera diras, ke li eksciis de Sankta Johano la Baptisto, ke la malkovro de teroj okcidente estus granda profito por la judoj,

kiuj rabus, de la kristanoj, la tombon de Kristo. Sed oni vidis tiun Kolombon fariĝi franciskano pro oportunismo, kaj tio relativigas la opiniojn, kiujn li esprimis.

Tre certe nutrita de judismo, Kolombo estas homo de tiu tempo, tempo mesia, kiam la limoj inter la religioj estas malnetaj kaj la konvertoj truditaj. Konvinkita, ke li estas elektita de la providenco, la meminstruita Kolombo sin nutras per tiuj kontraŭdiraj fluoj. Li skribas en la "Libro de la profetaĵoj": "Mi debatis kun erudiciaj homoj, klerikoj kaj laikoj, latinoj kaj grekoj, judoj kaj maŭroj kaj kun multaj aliaj... Mi diras, ke la Sankta Spirito blovas sur la kristanoj, la judoj kaj la maŭroj kaj sur ĉiuj aliaj sektoj". Lasta rimarko: sur la tri ŝipoj, kiuj foriris por la unua vojaĝo estis neniu pastro, sed iu interpretisto, kiu parolis la lingvojn araban, aramean kaj hebrean, Luis de Torres, iu judo, kiun oni baptis tuj antaŭ la enŝipiĝo!

La zorgoj de Kolombo sur la maro-
Oficiale Kolombo diris, ke li intencas iri al la lando priskribita de Marko Polo, kaj cetere li kunportis leteron por la granda Ĥano. Sed plurfoje, li aludis dum la vojaĝoj pri la "tera paradizo". Tiuj du celoj ne estas kontraŭdiraj. Oni supozas, laŭ la diversaj marĝenaj notoj de Kolombo, ke li opiniis Indiojn sufiĉe nordaj, kie estas Usono, kaj pli sude, li imagis novan nekonatan teron, kie estus la "paradizo". Tial en diversaj okazoj li priskribis la malkovritajn terojn, kiel parto de Indio (oficiala celo), sed aliajn fojojn, li aludis pri tera paradizo.

Ekde la 10-a de septembro, Kolombo mensogis al siaj maristoj. Kiam la ŝipo navigis 60 leŭgojn, li anoncis nur 48 leŭgojn por "ke la maristoj ne timu pri la longeco de la vojaĝo". En 1494, kiam Kolombo kaj ĉiuj maristoj scias, ke oni ĝis nun malkovris nur insulojn, Kolombo trudas al siaj kunvojaĝantoj la devon aserti, ke oni malkovris "iun firman teron, kiu estas la komenco de la Indioj". Evidenta

mensogo.

Kiam Kolombo malkovris Trinidadon (1498) kaj ekvidis la veran kontinenton lia sinteno estis stranga. Li opiniis, ke estas nova tero, eble la "tera paradizo", sed en siaj raportoj, li neniam parolis pri Indio. Ekzemple li skribis: "Kaj mi diras, ke se tiu riverego ne venas de la tera paradizo, ĝi venas de tero situanta ĉe la sudo, kaj pri kiu, ĝis nun oni scias nenion". Sed krome li skribis: "Mi deziras kontroli tion, kion asertis la reĝo Johano (Johano la dua de Portugalio): tio estas, ke ekzistus okcidente tre granda firma tero". Nova mistero: Ĉu la reĝo de Portugalio antaŭsciis, ke ekzistas okcidenta tero, kiu ne estas la Indioj, kiujn li, la reĝo, serĉis? Tio klarigus, ke la reĝo rifuzis la projekton de Kolombo sciante, ke tia vojaĝo ne kondukos al la Indioj, sed al alia kontinento. Oni ankaŭ povas sin demandi, kial Kolombo ne esploris tiun kontinenton, kiun li nomis "Tero de Graco"? Iuj asertas, ke li kredis, ke temas pri la tera paradizo, kaj timis antaŭ tiel malpermesata tero. Aliaj pli simple aludas pri malsaneco de Kolombo; Oni tute ne povas respondi al tiaj demandoj. Oni eĉ povas aserti, ke Kolombo ĉiam kredis pri la ekzisto de tera paradizo, kiun li priskribis tiel: "La mondo ne estas tiel sfera, kiel oni priskribas ĝin, sed ĝi havas formon de piro, kiu estus tute ronda krom en la loko kie estas la tigo, kiu estas la punkto la plej elstara... La tera paradizo estas sur tiu supra parto al kiu oni supreniras laŭ deklivo, kiu komenciĝas de malproksime".

(daŭrigota)

KVIZO - Respondoj:

- 1- Richard Henry Geoghegan (1866-1943)
- 2- Francisco Valdomiro Lorenz (1872-1957)
- 3- Eugène Adam (1879-1947), plej konata per sia pseŭdonimo Lanti.
- 4- Edmond Privat (1889-1962)
- 5- Vasilij Eroŝenko (1890-1952)

STRANGA

PROCESIO

(Frederic Mistral)

En Sankta-Mifelo ni havis iun pastron, kiun oni nomis S-ro Talon: negrava abato Avignon-a, malgranda, grasa, dikventra, kun vizaĝo ruĝa kiel kukurba botelo de almozulo. La ĉefepiskopo de Avignon forprenis de li la privilegion de la konfespreno, pro tio ke li tro levis la kubuton (*), kaj sendis lin al ni por malembarasi sin je li.

Kaj, por la festo de l'Sankta-Sakramento, okazis ke, iun ĵaŭdon, oni kondukis nin al Boulbon, najbara vilaĝo, por partopreni en la procesio: la malpli junajn por porti la bonodor-fumilon, la pli junajn por disĵeti florojn; kaj al S-ro Talon, tre malsaĝe, ho ve! oni faris la honoron de baldakeno.

Ĉe l'momento, kiam la viroj, virinoj, junulinoj malvolvis siajn delegitarojn sur la stratoj tapetitaj surfasade per littukoj, ĉe l'momento, kiam la religiaj asocioj movis ondolinte siajn standardojn ĉe l' suno, kiam la floristinoj, blanke vestitaj, per siaj virgaj voĉoj ekkantis siajn himojn, kaj kiam, piaj kaj silentegaj, antaŭ la Sankta-Sakramento, ni ŝvingis la bonodorfumilon kaj disĵetis niajn florojn, jen subite bruo ekestas, kaj...kion ni vidas? Dio Bona! la kompatindan S-ron Talon, kiu, balanciĝante kiel sonorileto, kun la sankta hostiujo en la manoj, la ora mantelo sur la dorso, aj! plene mem okupis la tutan straton.

Tagmanĝante ĉe la pastra domo, laŭŝajne li trinkis, aŭ eble oni trinkigis lin iomete pli ol dece, da tiu bona vino el Frigolet, kiu tiel rapide varmigas la kapon; kaj la malfeliĉulo, ruĝa pro honto same kiel pro la vino, ne plu povis stari. Ĉiu el la du ekleziuloj vestitaj per dalmatiko, kiuj faris la ritojn kiel diakono kaj subdiakono, lin subtenis sub la brakoj; la procesio eniris; kaj tiam S-ro

Talon, foje antaŭ la altaro, ekripetis " Oremus, oremus, oremus," kaj ne povis diri ion pli. Oni alkondukis lin en la sakristion.

Sed, imagu la skandalon! Feliĉe tio okazis en paroĥo, kie la "sankta likvoro," kiel dum la tempo de Bakĥo, konservis sian riton. Apud Bulbon, sur la montaro staras malnova kapelo nomita Sankta Marceleno, kaj la 1-an de junio, la Bulbonanoj iras al ĝi procesie, ĉiu tenanta en la mano botelon da vino. La virinoj ne estas akceptataj, pro tio ke niaj edzinoj, laŭ la pasint-tempa romia tradicio, trinkis nur akvon; kaj por kutimigi la junulinojn al tiu ĉi regulo, oni ĉiam diris al ili - kaj eĉ nuntempe oni diras al ili - ke " l'akvo beletigas".

Abato Talon ne forgesis konduki nin, ĉiujare, al la Procesio de la Boteloj. En la kapelo la Bulbona pastro sin turnis al la popolo kaj diris: "Miaj fratoj, malŝtopu viajn botelojn, kaj silentiĝu por la beno!". Kaj tiam, vestita per ruĝa mantelo, li solene kantis la formulon interkonsentitan por la beno de la vino. Poste, dirinte "amen", ni krucosignis kaj trinkis glutaĵon. La pastro kaj la vilaĝestro intertintigis siajn glasojn kaj religie trinkis. La morgaŭan tagon, en senokupa festotago, oni procesie portis la buston de Sankta Marceleno tra la kamparo, ĉar la Boulbonanoj diras: "Sankta Marceleno, taŭga por la akvo, taŭga por la vino".

Alia pilgrimo ankaŭ agrabla, kiun ni vidis en la Montagnette (Malalta Monto) kaj kies kutimo forpasis estas la pilgrimo de Sankta Anthime. La loĝantoj de Graveson ĝin faris.


Kiam la pluvo malfruiĝis, la konfesantoj el Graveson, trene legante siajn litaniojn kaj sekvataj de multego da homoj portantajn sakojn sur la kapo, alportis Sanktan Anthime - buston kun elkaviĝantaj okuloj, mitro, barbo, ruĝega vizaĝo - en la preĝejon Sankta Mifelo, kaj, tie, en la bosko, dismetinte la provizojn sur la bonodoran herbon por atendi la pluvon, oni pie trinkadis la vinon el Frigolet. Kaj ĉu vi ja tion kredos? Pli ol unufoje

la pluvego superakvis la hejmen-revenantojn...Kion kredi? "Kanti faligas la pluvon", diris niaj prapatroj!

Sed atentu! Se Sankta Anthime, malgraŭ la litanioj kaj la piaj trinkadoj, ne sukcesis naski nubojn, la gajaj konfesantoj, revenante al Graveson, deziris lin puni pro tio, ke li ne plenumis ilian preĝan peton; ili subakvigis lin trifoje en la "Fosaĵon de Lones". Ĝrempi la sanktajn korpojn en la akvon por devigi ilin pluvo-faligi estas kurioza kutimo, kiun oni retrovis en diversaj lokoj en Francio kaj eĉ en Portugalio.

(*) levi la kubuton = trinki.

El "Memorskriboj kaj rakontoj"
tradukis Johanino Florens.



MEMORIGENDAĴO

...La plej ĉefaj problemoj, kiujn estis necese solvi, estis la sekvantaj: 1) ke la lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante; 2) ke ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu tuj ĝin uzi por la komprenigado kun homoj de diversaj nacioj, tute egale ĉu tiu ĉi lingvo estos akceptita de la mondo kaj trovos multe da adeptoj aŭ ne, t.e. ke la lingvo jam de la komenco mem dank'al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikigoj.

3) Trovi rimedojn por venki la indiferecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponitan lingvon kiel lingvon vivan, ne kun ŝlosilo en la manoj kaj en okazoj de ekstrema bezono.

El ĉiuj projektoj, kiuj en diversaj tempoj estis proponitaj al la mondo, ofte sub la laŭta, per nenio pravigita nomo de "lingvo tutmonda" neniu solvis pli ol unu el la diritaj problemoj...Antaŭ

ol mi transiros al la klarigo de tio, kiel mi solvis la supre diritajn problemojn mi devas peti la leganton mediti iom pri la signifo de tiuj ĉi problemoj kaj ne preni tro facile miajn rimedojn de solvo sole nur tial, ĉar ili aperos al li eble kiel tro simplaj. Mi petas tion ĉi tial, ĉar mi scias la inklinton de la plimulto da homoj rigardi aferon kun despli da estimego, ju pli ĝi estas komplikita, ampleksa kaj malfacile digestebla. Tiaj personoj, ekvidinte la malgrandan lernolibron kun plej simplaj kaj por ĉiu plej kompreneblaj reguloj, povas preni la aferon kun ia malestima malŝato, dum ĝuste la atingo de tiu ĉi simpleco kaj mallongeco, la alkonduko de ĉiu objekto el la formoj komplikitaj, el kiuj ili naskiĝis, al la formoj plej facilaj, prezentis la plej malfacilan parton de la laboro.

(El la Unua Libro de la lingvo
Esperanto)

MONTE KRISTO

Alexandre DUMAS

(Sekvo)

Traduko de R. Dupuis

(Pro falsa akuzo Edmond Dantes estas enkarcerigata en la marfortreson IF.)

Post multaj turniĝoj laŭ la irata koridoro, Dantes vidis malfermiĝi antaŭ li pordon kun fera krado; la poliestro frapis trifoje per fera frapilo, kiu kvazaŭ trafis Dantes ĉe la koro; la pordo malfermiĝis, la du ĝendarmoj neforte puŝis la ankoraŭ hezitantan malliberulon. Dantes transpasis la sojlon kaj la pordo brue fermiĝis malantaŭ li. Li nun spiris alian aeron, pezan kaj haladzan: li estis en karcero.

Oni kondukis lin en ĉambron sufiĉe puran sed kun krado kaj riglilo; tamen ne tro timigis lin la aspekto de tiu loĝejo; cetera la paroloj de la reĝa vicprokuroro, kies voĉo ŝajnis al Dantes interesoplena, ankoraŭ resonis en liaj oreloj, kiel dolĉa promeso esperiga.

Jam estis la kvara horo posttagmeze, kiam Dantes estis kondukata al sia ĉambro. Tio okazis la 1-an de marto; la malliberulo baldaŭ troviĝis en la mallumo. Tiam akriĝis lia aŭdsentemo same kiel malaperis lia vidpovo. Kiam atingis lin la plej eta bruo li tuj ekstaris kaj iris ĝis la pordo, konvinkite ke alproksimiĝas liberigonto; sed la bruo formortis al alia direkto kaj Dantes refalis sur sian tabureton. Fine, ĉirkaŭ la deka horo vespere, ĝuste kiam Dantes komencis malesperi, aŭdiĝis nova bruo, kiu ĉifoje ŝajnis alproksimiĝi al la ĉambro; efektive paŝoj ekbruegis en la koridoro kaj haltis antaŭ lia pordo; ŝlosilo turniĝis en la seruro, la rigliloj grincis kaj la masiva kverka baraĵo malfermiĝis aperigante en la malhelan ĉambron la blindigan lumon de du torĉoj. En tiu torĉa lumo Dantes vidis la brilantajn sabrojn kaj muskedojn de kvar ĝendarmoj. Li

faris du paŝojn antaŭen sed tuj haltis vidante tiun forto-plion. "Ĉu mi foriru kun vi?" demandis Dantes. "Jes", respondis unu el la ĝendarmoj. ". Ĉu laŭ ordono de la reĝa vicprokuroro?". "Sendube". "Bone", diris Dantes, "mi estas preta vin sekvi". Konvinkite, ke tiuj viroj venis komisiitaj de la vicprokuroro, la kompatinda junulo tute ne timis; li do antaŭeniris, kun trankvila spirito kaj senĝena sinteno kaj metis sin propra-vole meze de la eskorton. Veturilo atendis lin ĉe la stratpordo, kun fiakristo sur sia sidloko kaj polica ĉefo apud li. "Ĉu por mi tiu veturilo staras tie?" demandis Dantes. "Jes", respondis unu el la ĝendarmoj, "eniru!". Dantes volis fari rimarkon sed la pordo malfermiĝis kaj li sentis, ke iu enpuŝas lin. Li nek povis nek emis rezisti. Li tuj troviĝis sidanta funde de la veturilo, inter du ĝendarmoj. La aliaj du eksidis sur la antaŭa benko kaj la peza maŝino formoviĝis timige brue.

La malliberulo rigardis la aperturojn: ili estis krado-havaj. Mur ŝanĝiĝis lia malliberejo, sed ĉi tiu ruliĝis kaj lin transportis al nekonata loko. Tra la stangoreto tro densa por ebligi manpason, Dantes vidis, ke laŭ konataj stratoj oni iris al la kajo. Baldaŭ la veturilo haltis, la polica ĉefo malsuprenpaŝis kaj alproksimiĝis al la gardistejo; dekduo da soldatoj eliris el ĝi kaj viciĝis; en la lumo de la kajaĵ lanternoj Dantes vidis la brilon de iliaj pafiloj. "Ĉu por mi" li demandis, "oni elmontras tian militistan forton?". La polica ĉefo, kvankam ne parolante, respondis la demandon, ĉar malŝlosinte la pordon, li malkovris al Dantes vojon, inter du soldatvicoj, kondukantan ĝis la haveno. La du ĝendarmoj, kiuj sidiĝis sur la antaŭaj benketoj malsuprenpaŝis la unuaj; sekvis la malliberulo kaj la du aliaj ĝendarmoj. La grupo marŝis al kanoto, kiun marista doganisto tenis per ĉeno. La soldatoj rigardis Dantes dum li pasis, kun mieno stulte scivola. Rapide li estis instalita ĉe la

poŭpo de l'boato, denove inter tiuj kvar ĝendarmoj dum la polica ĉefo lokigis sur la pruo. Forta skuo puŝis la boaton for de la bordo; obee al kria ordono, la ĉeno, kiu fermas la haven-alirejon, malleviĝis, kaj Dantes troviĝis en la tiel nomata "Friulo", t.e. ekster la haveno. Unue la malliberulo sentis ĝojon pro la plena aero. Aero preskaŭ signifas liberon. Li plenbruste spiris tiun vigligan venteton, kies flugiloj alportas ĉiujn nekonatajn odorojn de la nokto kaj de la maro. Tamen li baldaŭ eligis ĝemon; li preterpasis la "Reserve", kie li estis tiel feliĉa la matenon mem antaŭ sia aresto; kaj nun, tra la grandaj aperturoj de du fenestroj, atingis lin la ĝoja bruo de balo. Dantes kunigis siajn manojn, levis la rigardon al la ĉielo kaj preĝis.

La boato pluiris; preterpassinte la "Mortkapo"-n, ĝi nun situis kontraŭ la Faro-golfeto, baldaŭ preteriranta la kanonejon: manovro tute ne komprenebla de Dantes. "Kien, do, vi kondukas min?" li demandis al unu el la ĝendarmoj. "Tion vi scios baldaŭ". "Sed...". "Estas malpermesite al ni doni al vi klarigojn".

Dantes estis kvazaŭ soldato; fari demandojn al subuloj, kiuj ne havas la permeson respondi, ŝajnis al li absurde; li silentis.

Tiam, plej strangaj pensoj trapasis lian spiriton: per tia barko oni ne povis iri longan vojon; neniu ŝipo atende staris ĉe la ankro; li pensis, ke oni baldaŭ elboatigos lin ie malproksime de la kontinento, dirante, ke li estas libera; ŝajnis al li bonaŭgure, ke li ne estis katenita; cetere, ĉu la vicprokuroro, tiel bona por li, ne diris, ke kondiĉe ke li estu diskreta, estas neniu motivo por timi? Ĉu ne estis detruita antaŭ li la denunc-leteron? Li do atendis, muta kaj enpenso, provante trabori la mallumon per siaj maristaj okuloj, kutimiĝintaj al la nokta spaco.

Oni jam preteriris la insulon Ratonneau, kie radiis la lumturo, kaj nun montriĝis la golfeto de la Katalunoj. La rigardo de la malliberulo vigliĝis ĉar tie loĝas Mercedes kaj ŝajnis al li, ke li

vidas sur la marbordo la neprecizan figuron de virino. Kial neniu intuicio diris al Mercedes, ke ŝia fianĉo preterpasas je tricent paŝoj? Nur unu lumo brilis ĉe la Katalunoj kaj pro la situo de tiu lumo Dantes komprenis, ke, sola en la kvartalo, Mercedes maldormas. Kriegon lian ŝi povus aŭdi. Kvazaŭ honto detenis lin. Kion pensus tiuj homoj, kiuj rigardas lin? Li restis muta fikse rigardante la lumon. Dume la barko pluveturis; sed la malliberulo pensis nur pri Mercedes. Roka kabeto malaperigis la lumon. Rigardante returne Dantes rimarkis, ke la boato distanciĝas de la marbordo. Dum li perdiĝis en siaj pensoj la remiloj estis anstataŭigitaj per veloj kaj nun la boato iris puŝata de la vento.

Kvankam Dantes ne ŝatis fari pliajn demandojn al la ĝendarmoj, li alproksimiĝis kaj prenis lian manon: "Kamarado, nome de via konscienco kaj honore al via soldateco, mi petegas vian kompaton kaj respondon. Mi estas kapitano Dantes, franco bona kaj lojala, kvankam aĉe akuzita pri perfidaĵo de mi ne konata: kien ni nun iras? Respondu kaj, fidu mariston, mi faros mian devon kaj rezignacios je mia sorto". La ĝendarmoj gratis sian oreilon, rigardis sian kamaradon. Ĉi tiu faris movon signifantan: "Ŝajnas al mi, ke ne plu estas risko". "Vi estas Marsejlo kaj maristo kaj vi demandas min, kien ni iras?". "Jes, vorton de honoro, mi tion ne scias". "Ĉu vi tion eĉ ne konjektas?" "Tute ne". "Ne eblas!". "Mi ĵuras sur la de mi plej amata ulo en la mondo. Respondu, mi petegas!". "Sed oni ordonis al ni...". "La ordonoj ne devigas vin silenti pri tio, kion mi scios post dek minutoj, post duon-horo, eble post unu horo. Forigu necertecon kvazaŭ jarcenton-daŭra. Mi petas tion al vi kvazaŭ al amiko. Mi intencas nek ribeli nek forkuri; cetere mi tion ne povus. Kien iras ni?". "Se vi ne havas vindaĵon sur la okuloj kaj se vi nur unu fojon eliris el la haveno de Marsejlo, vi ja povas diveni kien ni direktiĝas". "Ne". "Nur rigardu ĉirkaŭen".

Dantes ekstaris kaj rigardis la lokon al kiu la boato ŝajne direktiĝis, kaj je cento da klaftoj antaŭe li vidis la altan rokon nigran kaj krutan sur kiu staras, kiel superflua silika aldonajo, la malhela If-kastelo. Tiu stranga formo, tiu malliberejo ĉirkaŭ kiu regas tiel granda teruro, tiu fortikaĵo, kiu dum tri jarcentoj famigis la urbon Marsejlo per siaj funebrecaj tradicioj, tiel abrupte aperanta antaŭ Dantes, kiu ne pensis pri ĝi, efikis al li kiel eŝafodo, kiun ekvidas mortokondamito. "Dio mia! La If-kastelo! Sed kion mi faru tie?". La ĝendarmo ekridetis. "Vi ja ne intencas konduki min en tiun malliberejon?" demandis Dantes. "La If-kastelo estas ŝtata malliberejo destinita nur al gravaj politikaj kulpuloj. Mi faris nenion kriman. Ĉu estas juĝistoj aŭ enketistoj en la fortikaĵo?". "Mi supozas," respondis la ĝendarmo, "ke tie troviĝas nur guberniestro, gardistoj, garnizono kaj fortikaj muroj. Nu kamarado, ne ŝajnu tian miron; vere mi kredus, ke vi moke respondas al mia bonvolemo". Dantes premegis la manon de la ĝendarmo kvazaŭ romp-intence. "Vi do pretendas, ke mi estas kondukata, kiel malliberulo enkarcerigenda en la If-kastelon?". "Plej verŝajne," respondis la ĝendarmo, "sed ĉiuokaze, kamarado, ne necesas min premi tiel forte". "Ĉu sen plia enketo, sen plia formalajo?" demandis la junulo. "La enketo estas farita kaj la formalajoj plenumitaj". "Do, malgraŭ la promeso de la prokuroro S-ro Villefort...". "Mi ne scias ĉu s-ro de Villefort ion promesis al vi", daŭrigis la ĝendarmon, "sed mi bone scias, ke ni veturas al la If-kastelo. Sed, kion vi faras?.. Helpu, kamaradoj!". Per fulmorapida movo, kiun la ekzercita okulo de la ĝendarmo tamen vidis, Dantes provis ĵeti sin en la maron; sed kvar fortaj pugnoj lin retenis ĝuste kiam liaj piedoj forlasis la boatan plankon. Li refalis sur la fundon de la barko, kun koler-kriegoj. "Ha ha!" ekkriis la ĝendarmo kun genuo premanta lian bruston, "ha ha! tiel vi plenumas vian promeson de maristo! Fidu do al tiaj ruzulaĉoj! Sed jen mia knabo, faru nur moveton, unu solan moveton; tiam estos kuglo por via kapo! Unu ordonon mi ne obeis sed estu certa, ke aliajn

mi obeos". Kaj li efektive mallevis sian karabenon al Dantes, kiu sentis sur tempio ĝian premantan ekstremon. Momenteton li volis fari tiun movon malpermesitan kaj meti finan punkton al tiu neatendita malfeliĉo, kiu falis sur lin kaj premegis lin, kiel vulturaj ungegoj. Sed pro tio ke tiu malfeliĉo estis neatendita, Dantes pensis, ke ĝi ne daŭros. Li memoris pri la promesoj de s-ro de Villefort; kaj necesas aldoni, ke tia morto, fare de ĝendarmo, funde de boato, aspektis malbela kaj senvalora. Li do refalis funden kun koler-ekkrio kaj furioze tordis siajn manojn.

Preskaŭ samtempe albordiĝa skuo okazis. Unu el la boatistoj saltis sur la rokon, kiun ĵus ektuŝis la bark-antaŭajo; ŝnuro grincis elvolviĝante de sur la pulio, kaj Dantes komprenis, ke ili alvenis. Liaj gardistoj, kiuj tenis lin kaj ĉe la brakoj, kaj ĉe la kolumo de lia vesto, devigis lin ekstarti por ke li surlandiĝu kaj trenis lin al la ŝtupoj kondukantaj al la pordego de la fortikaĵo, dum la ĉefo, armita per bajonet-muskedo, sekvis lin. Cetere Dantes ne plu vane rezistis; lia malrapideco estis pli inertdevena ol kontraŭaga; li sentis kapturigojn kaj ŝanceliĝis kiel ebrulo. Denove li vidis du vicojn de soldatoj sur la kruta deklivo, ŝtuparoj devigis lin levi siajn piedojn, li konsciis, ke li pasas tra pordo, kiu estas fermata post li; sed ĉio okazis kvazaŭ mekanike, tra nebulo, preskaŭ ekster lia konscio. Li eĉ ne plu vidis la maron, kiun rigardas la malliberuloj kun dolorego, ĉar ili kruele sentas ĝian netransireblan vastecon.

Tie oni atendis proksimume dek minutojn; la ĝendarmoj estis liberlasintaj Dantes, certaj ke li ne plu povas eskapi. Ili atendis ordonojn, kiuj alvenis: "Kie estas la malliberulo?" iu demandis. "Ĉi tie", respondis la ĝendarmoj. "Li sekvu min al sia loĝejo". "Iru" diris la ĝendarmoj, puŝante lin antaŭen.

tradukis Roland Dupuis

(daŭrigota)

POR VIA DISTRO

1	LITEROJ	VORTO	R	P
1	RIĜKESU			1147
2	SIGPTEI	KREIĜUS	G8	78
3	PRTANEE	PRETIGIS	9F	67
4	HMEĜAJĈ	ESPERANT'	Ĵ7	82
5	MAJĜNTA	ĈEĤ'	K6	78
6	SOĤIMNA	HANĜITAJ	H5	98
7	OAZALEU	HAMSINO	Ĥ1	111
8	OLSRMA*	AZULEĤA	1F	57
9	G*OISLJ	(T)RANSLOK'	8A	78
10	ŜIRKEA	ĴOMGLIST'	A1	104
11	AŜAODFI	RIKĤE	Ĵ1	49
12	DBUOOOJ	AFIŜADON	Ĉ1	82
13	BUOJEJK	ODO	K1	80
14	KĴFŬOUH	JUBETO	15H	39
15	HUĈBEJO	FAŬKOJ	C7	41
16	BOEJKKU	HAĈU	5C	20
17	KKUVZHU	DEJOJ	12A	24
18	KUZHVCJ	VOKU	11B	25
19	KUHCJC	VIZ'	3C	18
20	HCC	JUKU	E2	16
21				
22				1147
23				
24				
25				

Al kiu apartenas la zebro?

La Norvego loĝas en domo 1. La dua domo estas blua. Oni trinkas lakton en la tria. La verda domo staranta dekstre de la ebura kaj ĉar la angla domo estas ruĝa, la unua domo estas flava. Do la "Gauloise" fumanto loĝas en la unua domo. La ĉevalo estas en la dua. Laŭ la proponoj 4, 5, 9, 13 la Norvego trinkas akvon.

Ĉar la unua domo estas flava, la dua blua, kaj ĉar la verda staras dekstre de la ebura, la tria domo povas esti nur ruĝa aŭ ebura. Se la tria domo estus ebura ni havus: la verda domo estas la kvara; la kaftrinkanto loĝas en ĝi; la kvina domo estas ruĝa kaj la Anglo loĝas en ĝi; la rusa tetrinkanto devus loĝi en la 2-a domo kaj la "Lucky Strike" fumanto trinkanta oranĝan sukon loĝus en la 5-a aŭ inverse. Do la "Old Gold" fumanto povas loĝi nur en la 3-a aŭ la 4-a domo. Do la tria domo estas ruĝa kaj la Anglo loĝas en ĝi. La 4-a domo estas ebura kaj la 5-a verda kaj oni trinkas kafon en ĝi. La dua domo, kie oni ne trinkas kaj kie estas neniu besto, apartenas al la Ruso. Do la "Lucky Strike" fumanto loĝas en la 4-a domo, la "Gitanes" fumanto en la 5-a, la Hispano en la 4-a, la "Old Gold" fumanto en la 3-a, la "Chesterfield" fumanto en la 2-a, la posedanto de la vulpo en la 1-a kaj la posedanto de la zebro en la 5-a. La zebro apartenas al la Japano.

SKRABLO-PROBLEMO

Al la listo de la preparotaj literoj aperinta en la antaŭa numero de la revuo bonvolu aldoni 2 blankajn kvadratojn (aŭ 2 stelojn), kiu havos nenium valoron sed anstataŭos iun ajn el la literoj.

Por refari la ludon, uzu kaŝilon, kiu montras nur la unuan linion kun la unuaj sep literoj. Kiam vi trovis vorton, ŝovu malsupren la kaŝilon kaj vi malkovros la proponitan vorton, ĝian referencon, ĝian poentan valoron kaj la sekvantajn 7 literojn, ktp. Tiel ĝis la elĉerpigo de la 102 literoj aŭ kiam restas nur vokaloj aŭ konsonantoj.

Referenco: sur ordinara ludilo. La kolumnoj (vertikalaj) havos indikon de 1 ĝis 15, kaj la linoj (Horizontalaj) de A ĝis K, laŭ la esperanta alfabeto. La referenco indikas la lokon de la vorto sur la krado. Se la referenco komenciĝas per litero (ekz. G4), la vorto estas horizontala; se ĝi komenciĝas per cifero (ekz. 4G), la vorto estas vertikale lokita. La dua indiko de la referenco situas la vorton en la kolumnon aŭ la linion.

Referenca vortaro: P.I.V. La reguloj samas tiujn de "Scrabble".

Pri esperantlingvaj filmoj ĝenerale
kaj speciale pri

ANGOROJ

kelkajn minutojn kun

J.-L. Mahé

"Kiu? J.L. Mahé? Mi konas tiun nomon. Jes...Mi nun memoras. Ĉu ne li desegnis la kovrilpaĝon de Kulturaj Kajeroj?" - "Ne li, sed lia fratino." - "Sed kion li faris?" - "Ĉu vi ne memoras, Grezidonanoj, tiun mezgrandan brunulon, kiu plurfoje vizitis la Kulturdomon, kaj kun kamero ĉemane persekutis vin en la kursĉambron, la salondon, la mangoĉambron, koridorojn, ktp... Tiutempe li preparis filmon pri la kastelo, kiun vi havis la okazon vidi en Gresillon". - "Jes. Mi memoras lin kaj lian filmon, kiu renkontis grandan sukceson". - "Antaŭ multaj jaroj li jam faris alian, senparolan, filmon. Tute sekrete mi diras al vi, ke li nun faras esperantlingvan filmon. Venu kun mi lin viziti. Li mem klarigos la aferon".

Demando- Kara Mahé, farante tian filmon, kiu estas via celo?

Respondo- Tre simple, tiu deziro tiklis min jam de multaj jaroj. Mia celo? Starigi la unuan, laŭ mia scio, filmon originale verkitan, luditan, registritan rekte en esperanto, per esperantlingvaj aktoroj.

D- Ĉu temas pri filmo pri esperanto aŭ nur filmo esperantlingva?

R- Ĝi ne estos ekzakte propagandfilmo, Taŭ la ĝenerala signifo de tiu esprimo. Neniam eĉ oni elaudos la vorton "esperanto". Tamen mi multe esperas el ĝia varbkapablo, pro tio, ke mi volis fari demonstracion pri la vivanteco kaj parolebleco de nia lingvo. Alivorte, ni diru ke ĝi estos, se ne perfida, almenaŭ maskvestita propagandilo.

D- Kiu estas la titolo? kaj la temo?

R- La titolo? "Angoroj". La temo?

Mallumega "grandĝinjola" drama.

D- Kiu verkis la parolojn? kiu ĝin

interpretas?

R- La dialogoj estas miaj. Ili estas eseo bazita sur slanga lingvaĵo. Mi neniam sufiĉe omaĝos miajn interpretantojn. En drameca temo, oni senĉese promenas sur la limo de ridindeco se la kreantoj ne estas perfektaj. Nu, Jana Ravselj majstre ludis sian malfacilan rolon, kaj sub la aktora gvidado de Serge Flego, kiu tiel funde konas kaj scias ekspluati ĝiajn kapablojn, ŝi trafis momentojn de premege tragedio. Siaflanke Flego mem, en persono de Karleto, vivigis movplanan kaj paroleman ekzemplon de suburba faŭno. Se la interpretado de "Angoroj" devas esti sukceso, ĝi ŝuldas multon al la kontribuado de la Internacia Teatro pere de la paro Jana-Flego...

D- Ĉu vi renkontis materiajn malfacilaĵojn:

R- Jes, unu tre grava, kiu ege prokrastis la komencon de la laboro. Dum pli ol ses monatoj mi provis fari antaŭstudon de la merkato por juĝi ĉu tia afero estas amortizebla kaj ĉu la financ-rimedo de la esperantista medio permesos tion efektiviĝi. Mi ne nur sukcesis ricevi kvazaŭ-nenian validan informon sed mi eĉ ne trovis manieron ĝin vekti. Ĉiuj klopodoj restis vanaj. Fine Henri Micard desegnis al mi la konduktilinon: "Oni nenion respondos al vi pri projektoj. Prezentu realaĵojn. Same okazis al mi, kiam mi volis starigi Esperanto-domon. Fine mi ĵetis min en la akvon. Faru la saman". Kaj ankaŭ mi ĵetis min en la akvon.

Alian malfacilaĵon mi renkontis, sur tute alia tereno. Por iu sceno mi tre bezonis maljunulon blankbarban, kaj mi absolute ne trovis iun; ŝajnas, ke la raso de esperantistaj blankbarbuloj estingiĝis kun la milito. Nur junaj viroj havas barbon nun. Fine mi ŝminkis junan aktorinon. D- Mi supozas, ke vi esperas reenspezi la elspezitajn sumojn. Kiamaniere? R- Vi prave supozas. Kiamaniere? Nu, vendonte kopiojn de la filmo al sufiĉe da klientoj por amortizi la elspezojn. Ĉu tiuj klientoj estos sufiĉe multaj, ĉu ilia paŝo-

R- Mi tro dronas en la afero, jam de ses monatoj, por kapabli taksigi senpasie. Ŝajnas ke ĝi devus esti ŝtupo en la movado.



***** ^ *****



(listo de la perantoj sur la lasta kovril-paĝo)

LIBRO-SERVO

J. Vincent, 26 bis rue de Milngavie, F-49150 Baugé

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« UL » — « AN » :

« UL » kun diversaj radikoj : ĝibulo, altrangulo, posteulo, tieulo.

Rimarko : UL estas superflua ĉe pasivaj verboj, ĉar « ito », « ato », « oto », jam montras personon : konato, instruito, anstataŭ konatulo, instruitulo.


« AN » montras : « loĝanton » (ne naciecon) : Germanoj kaj Francoj kiuj loĝas en Rusujo povas esti Rusujanoj, kvankam ili ne estas Rusoj.

« membron de klubo » : klubano, senatano.

« adepton de doktrino » : oni uzas ANO aŭ ISTO laŭ la naciaj kutimoj : Kristano, Budaisto.

« simpatiantojn pli ol agemuloj » : esperantano, esperantisto.

« apartaj sencoj » : policano, policisto.



Spektajoj

Mi ne komprenas kial vi protestas plian-fojon !
Mi jam formetis mian ĉapelon. Cetere mi ne volas formeti mian perukon, ĉar mi ne volas montri min senharulo, kiel vi !



Vidpunkto

Kiel bela pejzaĝo ! Kiel freŝa aero ! Kia trankvileco ! Kial oni ne konstruas grandan urbon ĉi tie ? Imagu la feliĉon de la urbanoj, de la dungitoj, de la kampuloj !



Kontestado

Li estas la plej juna kaj la plej bruema ano en sia klubo, kiu propagandas por la egaleco de la rajtoj. Ĉar li rifuzas trinki porinfanan limonadon, alportu du aperitivojn.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).
- Belgio** : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).
- Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).
- Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).
- Germanujo Okc.** : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609).
- Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).
- Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).
- Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).
- Jugoslavia** : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.
- Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).
- Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol.).
- Pollando** : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).
- Portugalia** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa.
- Svedujo** : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (70 kr.).
- Svislando** : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).
- Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).
- Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34